

# PENSEO

N-ro 278

dec. / 2014

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 25-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)



### hundo-studento

hundo vaganta ofte iras en klasĉambron.  
tie li preferas sekvi anglalingvon kaj  
probablon.  
la evento disvastiĝas danke al la fola reto;  
lin faman volas tuj edzigi ne nur mojosa areto.

2012.11. 2 - 8

## serĉo de la formo


ekster la fenestro tamburoj eksonas.  
miaj oreloj ĉe la lakto hieraŭa dronas.  
infanoj nun surstrate marŝas en lerneja  
uniformo.  
ĉu iu panjo mian formon inter ili konas?



2012.11. 2 - 6

### semajnofino

ĉe sojlo kato kun muso ludas.  
hundeto kalkulas muŝojn fore.  
mi skajpas kun blindulo pri beleco modelina,  
demonstrante tuŝosenton de paralizulo fole.



2012.11. 3 - 17

## revenis mi al la lernejo

revenis mi al la lernejo  
kaj trovis la lokon kie sidis juna mi kvar  
jarojn.  
sur la podio en la ĉambro nun malplena,  
mi volis al mi mem demonstri de mi iritan  
vojaron.

2012.11. 4 - 36

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Malgranda arbo

Ĝi estis malgranda arbo, kvazaŭa arbusto, sed  
ĝi kapablis flugi tiam, kiam ĝi pensis pri  
flugiloj. Birdoj konfidis al ĝi la sekretojn  
alportitajn de vento.  
La arbeto ĝuis la sunradiojn kun dolĉeco,  
kaj la branĉoj tuj teksis ombbron por protekti  
infanojn kaj hundojn ludantajn sur la placo.  
Ĝi ankaŭ trinkis lunlumojn en kalikoj, kiujn la  
nokto servis dum solecaj festoj plenaj de  
silentaj steloj.  
Unu tagon ĝi malkovris la malfortikecon de  
sia trunko; la ŝelo maldensiĝis pli kaj pli  
kaj ĝi sentis timon. Do ĝi fermis la okulojn;  
kaj la eta aglo ekflugis.



Juiz de Fora, 08/09/2014.

# Scenaro

La matena piedirado sur la placo apud la apartamentaro tie, kie mi loĝas ŝajnas aparteni al la scenejo de filmo, kiu ŝanĝiĝas ĉiumomente. Kaj pli kaj pli mi permesas al mi tian apartenon.

La dolĉaodoro de ananaso ĉe foireto miksiĝas kun la silento de l' arboj, kiuj brakumas la bruegon de birdaro.

Sub la ombro de kiosko, viro vendas kokosan akvon kaj la impreson de ferioj ĉe marbordo.

Infanoj ludas kun hundoj, kiuj gaje kuras freneze; homoj marŝas haste (iuj kuras) kaj ili ne rimarkas la intensan blumon de la printempa mateno.

Je ĉiu paŝo, mia rigardo eltranĉas novan emociion. Hodiaŭ kortuŝis min la sceno de juna patro serioze nutranta per suĉbotelo la malsatan bebon.

Tamen nenio estas pli emocia ol la hundo trenanta radetojn ligitajn al ĝiaj malantaŭaj kruroj sub la atenta zorgo de la mastrino.



Juiz de Fora, 23/09/2014.

# Erozio

Malpermesi, ke vent' blovu  
sur l' ostaron de la roko?

Provas vane la poeto  
semante malnovajn revojn  
en fendojn kiujn printemp'  
ja insistas revivigi.

Juiz de Fora, 15/09/2014.

## Paŭlo Silas (Brazilo)



# TRANSVIVA SONO

Pensklarigan, kantsimilan sonon

Orelkonko kaptis facilpove.

Muziknotoj kreis sin sinmove.

Ĉu ellasis la Transviv' fantomon?

Kion ĝi, per kant', intencas montri?

Tion ĉi mi malkapablas sondi.

Ĉu respondon al problemo donos?

Ĉu deĉifro ankaŭ same sonos?

Aŭdsentumo sentas ion malsimilan,

Ion plian ol adiaŭdiran.

Ne komprenos la timpan' eĉ se ĝi sangus.

Se deĉifr' almenaŭ nun ne mankus,

Plasmfarita spektro povus alparoli.

Ĉu vi aŭdas kantsimile plu sonori?

# LA TEMPO

Se hodiaŭ vi verkas pri Twitter,

Sciu, ke morgaŭ neniu komprenos vin.

Nov' naskiĝas, nov' iĝas jam antikva

Kaj malaperas de sur kontinentoj kvin.

Virtuale vivante, vi volas

La vizaĝon alŝuti al Facebook.

Vane la bildo pentriĝas surekrane:

Bit' vin ne savos, vin vindos mortotuk'.

Ĉu, pri mp3, paroli? Ĉu pri pdf?

Venontaj formatoj ilin priridos fiere:

Fruaĝaj malkovroj, teknologi-ABC!

Do, pri provizoraj aĵoj, statu malklere

La vers' arton intencanta per ĉi ambici':

Anima nuanc' eniru poemojn de ni.

## Siv Burell (Svedujo)



### Aceraj folioj ĵus ŝanĝis koloron

Aceraj folioj ĵus ŝanĝis koloron,  
ricevis aspekton kiel ruĝan oron.  
Mirindan sperton donis al ni  
malgraŭ la scio ke la vintro venos  
kun malvarmaj ventoj, kiuj nin ĝenos.

Ĉu similas la vivo de homo  
al la naturo, kie ĉiu atomo  
vivas, sed ŝanĝas laŭ la sezono?  
Sed kiam por homoj estas tempo ora?  
Je la aĝo de 50 aŭ eĉ pli fora?

Folioj kaj homoj fariĝos tero.  
Kelkaj egaligas tion al dormo aŭ infero.  
Aliaj pensas ke animoj foriras  
al ĝuindaj lokoj, sed mi miras,  
ke kelkaj nur imagas unu vivon.

Ĉiuj vivas sed transiras  
al alia form', alia norm'.  
Eterna estas vivo,  
sen komenco, sen fino.  
Prizorgas nin dio aŭ diino!



Ilustraĵo de la aŭtorino

## Carlos Matari

### Pluvas

Pluvas  
La trotuaroj malsekaj estas  
Neniu spuro sur ili restas

La pluvo nian sekreton tenas.

Pluvas  
ĉe la fenestro mi vin sopiras  
la tagoj fremdas kaj min korŝiras  
malvarma tempo brakumas min

La pluvo falas sur la tegmentojn  
Kie sidis ni intime  
Kaj endormiĝis sen duboj, sentime,  
Sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras  
Sur min la pluvo serene ploras  
Ĉar vi estas for  
sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas  
Kaj la vundoj min damaĝas  
Se mi ne plu aŭdas vin

Pluvas  
kaj ĉiuj vortoj fariĝas nulo  
dum en la noktoj min hantas dubo  
pri la destino de tiuj kisoj

Pluvas  
Silento ŝvebas en la kvartalo  
La suno strebas tra nubo-baro  
Por plensekigo de trotuaro  
Por plensekigo de la tegmento  
Kie sidis ni intime,  
Kaj endormiĝis sen duboj, sentime,  
Sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras  
Sur min la pluvo serene ploras  
Ĉar vi estas for  
sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas  
Kaj la vundoj min damaĝas  
Se mi ne plu aŭdas vin

Sur la tegmentoj kie sidis ni intime,  
Kaj endormiĝis sen duboj, sentime,  
Sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras  
 Sur min la pluvo serene ploras  
 Ĉar vi estas for  
 sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas  
 Kaj la vundoj min damaĝas  
 Se mi ne plu aŭdas vin

Se mi ne plu aŭdas vin

*Esperantigis*



**Svena Dun (Hispanujo)**

## *Samkiel blanka papero*

(Kanzono en la persa lingvo)



*Kantistino: Shohreh Agshdashloo*

Mia vivo estis pura kaj netuŝita samkiel pura,  
 blanka papero  
 kaj grandan linion de mia sorto tuŝis neniu, ĝis  
 vi alvenis kaj plibeligis mian simplan vivon  
 vi montris amon al mi kaj desegnis ĝin por mi  
 samkiel tiuj nefinitaj kanzonoj kiujn ni  
 kutimis kanti dum nia infanecon, sed al ili  
 mankis muziko,  
 ankaŭ al mia vivo mankis koloro  
 vi aperis kaj plibeligis mian simplan vivon  
 vi montris al mi la amon kaj vi pentris ĝin por  
 mi  
 nun la mondo fariĝis tre bela por mi  
 en via rigardo videblas tute alia mondo  
 viaj okuloj samkiel du lumfontoj  
 estas spegulo de lumoplena morgaŭo  
 mia koro estis soleca kabano  
 kaj ĝia aŭroro pli nigris ol la nigra nokto  
 vi ekbrilis kaj varmigis ĝin  
 vi enamigis kaj moligis ĝin

vi beligis mian vivon  
 vi pentris mian vivon!...  
*Esperantigis*



**Mori (Usono)**

**Vinicius de Moraes**

## *Sambo en preludo*

Vivo sen vi  
 ne sencas por mi.  
 'Stas vi la motiv'  
 de mia sentiv'.

Jam nia ĝarden'  
 ne floras ĉar sen  
 vi malestas lum',  
 kaj mankas parfum'.

Sen vi jen mi  
 en ĉi sendirekt'.  
 Sen varm' de pasi',

ide' sen projekt',  
 rigard' sen persvard',  
 ĉi tristokultiv'...  
 Sen vi por mi ne plu pulsas kor', kaj viv'.

Ne tardu, venu.  
 Vi komprenu ke ankoraŭ brilas vivflamo.  
 De nun la amo,  
 la inspir' estu sur nia voj',  
 resopir' donu lokon al ĝoj'.

Ne plu ĉi solaj,  
 ĉi senrolaj ni iru, sufiĉu da driv'.  
 Ke venu amo!  
 sen vi por mi ne plu pulsas kor', kaj viv'

*esperantigis*



**Ŭel Roŝa (Brazilo)**

## Tamara Danz (1952-1996)



## Jen kant' por la homoj

(kantteksto)

Jen kant' por la homoj, por vi kaj por mi.  
 Jen kanto por multaj, kiuj fidas je si.  
 Al tiuj do kant', kiuj venos post ni.  
 Jen kanto por ĉiu kun vivfantazi'.  
 Jen kanto' por l' esper de graveda jam in'.  
 Jen kanto' por la idoj fidantaj nin.  
 Jen kanto al ĉiu hom' sen defend'.  
 Jen kant' por kolomboj blankaj en vent'.

Vivi, nur simple vivi...  
 Vi, vivemul', helpu nin.  
 Vivi, en paco vivi...  
 Por ĉiuj revoj,  
 revoj liberaj kaj sen lim'.

Jen kanto por tiuj, kiuj dormas laŭ ŝaf'.  
 Jen kanto ĝenanta ilin kun brav'.  
 Jen kanto por la blinda naiva pajac'.  
 Jen kanto por ĉiuj sen vort', sen aŭdac'.  
 Jen kanto por la sklavoj de l' mon', de l' potenc'.  
 Jen kanto por la dubo, por kor-konsekvenca'.  
 Jen kanto, ke ribeloj ne mortu pro mank'.  
 Kaj kanto pro verŝiĝoj de tiom da sang'.

Jen kant' por la nova, pacoplana tutmond'  
 Jen kant' por l' laboro, la vivtena font'.  
 Jen kanto por sopiro batanta en kor'.  
 Jen kanto por Tero, por ties favor'.

Jen kant' por la homoj, por vi kaj por mi.  
 Jen kanto por multaj, kiuj fidas je si.

Al tiuj do kant', kiuj venos post ni.  
 Jen kanto por ĉiu kun vivfantazi'.

Vivi, nur simple vivi...  
 Vi, vivemul', helpu nin.  
 Vivi, en paco vivi...  
 Por ĉiuj revoj,  
 revoj liberaj kaj sen lim'.

Vivi, nur simple vivi...  
 Vi, vivemul', helpu nin.  
 Vivi, en paco vivi...  
 Por ĉiuj revoj,  
 revoj liberaj kaj sen lim'.

*Esperantigis*



**Cezar (Germanujo)**

**Oskar de Lubiĉ-Miloŝ\***

## Kaleŝo staranta ĉe nokto

Atendante

Je l'ŝlosiloj  
 – li serĉadas ilin certe inter vestoj  
 De Theklo mortinta antaŭ tridek jaroj –  
 Vi aŭdu, Sinjorino, al malnova al obtuza  
 flustro nokta  
 De l'aleo...  
 Tiom malgrandan, malfortan, knabinetan  
 dufolde envolvitan en mantelon mian  
 Portos mi vin tra la rubusujoj tra la urtikejoj  
 de l'ruinaĵoj ĝis la alta nigra pordo  
 De l'kastelo.  
 Tiel la praavo en iamo venis hejmen ree de  
 Verĉelli  
 Kun la mortintino.  
 Kia domo muta, malfidema, malhelega  
 Por infanino mia!  
 Tion vi ja scias jam, Sinjorino, tristas la  
 rakonto.  
 Ili ĉiuj dormas dissemantaj en la foraj landoj.  
 Ili post cent jaroj lokoj atendas  
 Meze la monteton.  
 Per mi ilia idar' estingiĝas.

Ho vi reĝino ĉiruinaĵa!  
 Ni vidontas la belan dormoĉambron de  
 l'infanaĝ': tie  
 La supernatura profundec' de l'silent'  
 Estas la voĉ' de l'malhelaj portretoj.  
 Kuntirita sur mia lit' dum nokt'  
 Mi aŭdadis, kiel en kavo de armaĵo  
 Mez' la bruon de l'dipeciĝanta glacio  
 malfrostanta post la muroj  
 Ilian koron bati.  
 Al infan' timema, kiom patruj' sovaĝas!  
 Estingiĝas lantern', luno forvualiĝas,  
 La turstrigo al idaron en veprejo vokas.  
 La ŝlosilojn atendente  
 Vi dormu iom, Sinjorin'. – Dormu,  
 kompatinda etul' dormu  
 Palega, kun la kapo sur mia ŝultro.  
 Vi ja vidos kiom l'sopirstreĉa arbar'  
 Belas dum maldormoj la juniaj,  
 Ornamita per florkronoj, infanino mia ! kiel la  
 filino preferata  
 De l'reĝino freneza.  
 Vi involvu vin en mian vojaĝosurtuton:  
 La granda aŭtuna neĝ' sur viaj vangoj fandiĝas  
 Kaj dormemas vi.  
 Por infanin' timema tiom nigra domo!  
 ....  
 Fundfunde, fundfunde de l'Litova lando.  
 Ne, ne sinjorino, nenion aŭdas mi.  
 ....  
 Ĉiuj servistoj mortis  
 Kaj mi la memoron perdis.  
 Por infano fida tiom nigra domo!  
 Nur pri l'forcejo  
 De l'prapraavo, kaj teatro, mi memoras.  
 Orelstrigidoj tie manĝis en mia mano  
 La lun' alrigardis tra l'jasmeno;  
 Is la tempo.  
 Paŝobruon mi aŭdas de l'fund' de l'aleo.  
 Ombraĵon. Jen as Vitold' kun l'ŝlosilo.  
 \* O. V. de L. Milosz (Litove: Oskaras Milaŝius)  
 (naskiĝinta la 28-an de majo 1877 en la Rusia  
 imperio, pli precize en Belorusio, en teritorio de  
 estinta Granddukejo de Litovio, mortis en Francio en

1939), estas franclingva poeto. Li devenas de nobela  
 familio. Nevo lia estas pola verkisto Czesław Miłosz.  
 Li alvenis en Parizo 11-aĝe, studis, kaj plu vivis tie. Li  
 fariĝis frue poeto, en la franca lingvo, komence en ia  
 elegia stilo, fine al mistikaj tendencoj.

*Esperantigis*



**Roland Platteau**  
 (Francujo)

## Zhuangzi (369-286 a.K)



# Zhuangzi

### ĈAPITRO UNUA

## Feliĉa vagado en absoluta libero

### §01-01

En la Norda Maro troviĝas fiŝo nomata  
*kun-o*, kiu estas granda je oni ne scias kiom da  
 miloj da lioj. La fiŝo metamorfoziĝas en  
 birdon nomatan *peng-o*, kies dorso estas larĝa  
 je oni ne scias kiom da miloj da lioj. Kiam ĝi  
 ekleviĝas kaj flugas, ĝiaj flugiloj mallumige  
 kovras la ĉielon kvazaŭ nuboj. Kiam la vento  
 ekblovas sur la maro, kiu tajde ekŝvelas, tiu ĉi  
 birdego komencas alflugi al la Suda Maro, la  
 Ĉiela Lago.

En *Qi Xie*, kolekto de mirindaj rakontoj,  
 estas dirite: “Kiam la *peng-o* ekflugas al la  
 Suda Maro, ĝi frapas per la flugiloj la akvon,  
 kiu ŝprucas foren je tri mil lioj. Ĝi  
 suprenflugas sur kirlovento al la alteco de  
 naŭdek mil lioj. Ĝi forflugas en la sesa monato,  
 kiam blovas la ventego.”

La aermasoj estas similaj al galopantaj  
 ĉevaloj; la polveroj kaj mikrobiaj vivaĵoj, kiuj

estas portataj en la aero, flosas pelate de la ventospirado. La ĉielo sin montras blua. Sed oni ne scias, ĉu la lazuro estas la propra koloro de la ĉielo, aŭ nur la rezulto de la senfina alteco. Kiam la *peng-o* rigardas malsupren, certe la sama vidaĵo sin prezentas al ĝiaj okuloj.

Se akvomaso ne akumuliĝas sufiĉe profunda, ĝi ne povas porti grandan ŝipon. Verŝu tason da akvo en malgrandan kavon, kaj pajlero povos veturi tie kiel ŝipo. Provu flosigi la tason, kaj ĝi gluiĝos en la kavo, ĉar la akvo estas malprofunda kaj la “ŝipo” estas tro granda. Simile, se la vento ne estas sufiĉe forta, ĝi ne povas porti grandajn flugilojn. Tial, kiam la *peng-o* suprenflugas al la alteco de naŭdek mil lioj, ĝi devas havi fortan venton sub si kiel sian subportanton. Kaj nur tiam, kun la blua ĉielo supre, sen ia ajn baro sur la vojo, rajdante sur la vento, ĝi komencas vojaĝi al la sudo.

Cikado kaj juna turto mokridis la *peng-on*, dirante: “Ni tutforte flugas supren ĝis ni eksidas sur ulmo aŭ santalo por ripozo. Se iafoje, ni ne povas atingi ĝin, ni simple falas sur la teron. Kial do nepre flugi supren al la alteco de naŭdek mil lioj por vojaĝi suden?”

Tiu, kiu faras ekskurson al la verda kamparo ĉirkaŭ la urbo, kunportante kun si nutraĵon sufiĉan por tri manĝoj de unu tago, revenas kun sia stomako tiel plena, kiel li ekiris. Tiu, kiu vojaĝas cent liojn, devas provizi sin per nutraĵo sufiĉa por nokta halto. Kaj tiu, kiu vojaĝas mil liojn, devas provizi sin per nutraĵo por tri monatoj. Kiel do tiuj ĉi du bestetoj povus scii pri ĉio ĉi tio?

La malgranda sciado estas malsupera al la granda; la mallonga vivdaŭro ne povas esti egala al la longa. Kiel do oni ekscias, ke tiel estas? La fungo, kiu ekkreskas en la mateno kaj mortas antaŭ la vesperiĝo, ne konas la alternon de nokto kaj tago, nek la cikado la alternon de printempo kaj aŭtuno. Tiuj ĉi estas du ekzemploj de mallonga vivdaŭro. En la

nordo de la regno Chu troviĝas mirakla testudo, por kiu ĉiu printempo aŭ aŭtuno daŭras 500 jarojn; en la pratempo kreskis granda ĉina cedrelo, por kiu ĉiu printempo aŭ aŭtuno daŭris 8,000 jarojn. Tiuj ĉi estas du ekzemploj de longa vivdaŭro. Kaj Pengzu, kiu vivis pli ol 700 jarojn, nun ankoraŭ restas fama pro sia unika longviveco. Se ĉiuj volus egaligi sin al li, ĉu tio ne estus veinda?

La dialogo inter Tang kaj Ji enhavas la saman ideon.

Tang, la unua reĝo de la dinastio Shang, iam metis demandon al sia ministro Ji, dirante: “Ĉu ekzistas limoj al la supro kaj la malsupro, al la nordo kaj la sudo, al la oriento kaj la okcidento?”

Ji respondis: “Ekzistas limoj trans limoj. En la malproksima kaj malfekunda nordo etendiĝas maro, la Ĉiela Lago. En ĝi troviĝas fiŝo nomata *kun-o*, kiu estas larĝa je miloj da lioj kaj longa je oni ne scias kiom da lioj. Tie troviĝas ankaŭ birdo nomata *peng-o* kies dorso estas kiel la alta monto Tai kaj kies flugiloj estas kiel nuboj pendantaj de la ĉielo. Suprenfluginte sur kirlovento al la alteco de naŭdek mil lioj, la *peng-o*, alte super la nuboj kaj atmosfero kaj kontraŭ la blua ĉielo, direktas sian flugadon suden kaj plu flugas al la maro.

“Koturno en marĉo mokridis la *peng-on*, dirante: ‘Kien do ĝi vojaĝas? Mi eksaltas supren kaj apenaŭ mi atingas la altecon de dekoj da futoj antaŭ ol mi ree falas. Mi povas flugas nur inter la fragmitoj. Tio ja estas la pleja alteco atingita de mia flugado. Kaj kien do la birdego intencas vojaĝi?’”

Tia estas la diferenco inter la malgrandeco kaj la grandeco.

Iuj havas inteligentecon sufiĉan por la devoj de ia ofico. Aliaj, per sia bonkonduteco, povas servi kiel ekzemplo al unu distrikto, por ĝin harmoniigi. Ankoraŭ aliaj posedas la virton de princo kaj imponas al la tuta popolo de unu regno. Ili havas tro altan opinion pri si

mem, same kiel la cikado, la turto aŭ la koturno fieras pri si mem.

Tamen la filozofo Song Rongzi mokridis ilin, ĉar li mem ne sentis sin flatata tiam, kiam la tuta mondo laŭdis lin, nek sentis sin senkuraĝigita tiam, kiam la tuta mondo riproĉis lin. Li povis diferencigi la internan de la ekstera; li povis fari distingon inter la honoro kaj malhonoro. Jen ĉio, kion li povis fari. Kvankam li enmiksas sin en neniam vulgarejn aferojn de la mondo, tamen li havis ion ankoraŭ pli altan neatingita.

Iam Liezi povis rajdi sur la vento en libera kaj facila maniero. Ifoje li tiele vojaĝadis kaj revenis al sia loko post 15 tagoj. Li neniam enmiksas sin en la ĉasadon de mondaj feliĉaĵoj, sed, kvankam li povis liberigi sin de la piedirado, tamen li devis dependi ankoraŭ de io.

Kaj tamen ni supozu, ke ekzistas iu, kiu povas adaptiĝi al la veraj leĝoj de la universo kaj regi la ŝanĝiĝadon de la ses elementoj (t.e. jin-o, jang-o, vento, pluvo, mallumo kaj lumo), por vojaĝi en la senlima spacego. Kaj de kio do li devas dependi?

Kaj tial oni diras: “La perfekta homo havas nenian memon; la sankta homo havas nenian meriton; la saĝa homo havas nenian nomon.”



Esperantigis



Wang Chongfang (Ĉinujo)

# Ĉineske

## Vejdo (Ĉinujo)



## Lupo kaj Ŝafido

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Soife

ŝafid' al roĵo

iras trinki la akvon

klare puran kun ĝoĵo

sur streta voĵo.

Subite

jen renkontas ŝi

la lupon tre mizere

kiu serĉas kun mani'

manĝon tie ĉi.

Ŝafidon

vidas avide

li kun streĉaj okuloj

kaj paŝas malrapide

al ŝi decide.

Per pretekst'

kaj mava rimed'

li volas formanĝi ŝin

por malsata ventr' sen ced'

al la povra pred'.

Li krias:

“Vi malplezura

fripono, kial faras

vi la akvon malpura

per kirlo nura.

Mi volas

severe pune

deŝiros vian kapon



trinkos sangon subsune  
jen ĝuste nune.”

La ŝafid’  
nun diras pete:  
“Se vi lupreg’ permesas,  
mi ja trinkos kviete  
for de vi prete



*Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova*

malsupre  
de la rivero.  
Certe ne malpurigos  
mi akvon kun sincero  
kaj kun leĝero.”

Li sakras:  
“Demono vere  
vi ’tas. Kiel aŭdaca  
vi kondutas, cetere,  
kaj malsincere.

Ha, mi jam  
memoras klare,  
ke vi diris lastjare  
krudajn vortojn malŝpare  
kaj tenemare.”

“Pardonon,”  
diris kuraĝe  
la ŝafido konvinke,  
“Ne unujaras aĝe  
mi, nur malsaĝe.”

“Do certe

ja via frato  
faris tion laŭvole.  
Ne alvenu kompato.  
Jen via fato!”

Ŝi diras,  
“Ne fraton havas  
mi kaj vere ne kulpas.  
Via diro ne pravos,  
l’ intenco mavas.”

La lupu  
ja hurlas krie:  
“Malgraŭe vi ja kulpas,  
ĉar mi malsatas plie  
jam senracie.”

Dirante  
li ŝin tiras  
en la densan arbaron  
kaj forte ŝin disŝiras  
ŝmace elspiras.

*adaptita el fabloj de Krilov*

*\*Sopir-al-sudo: ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj  
de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Jadranka Miric (Serbujo)



Infanaj friponaĵoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Infanoj  
ridas okule,  
per larĝa rido sendas  
sunsalutojn etule,  
de lipangule.

Biskvitojn  
vi ĉi-matene  
po du en buŝon metis  
ambaŭmane, ĉi jene.  
Finmaĉis pene.

Fripone  
ekridetis vi  
pro mia troa timo.  
Nu gustumu, panjo, vi!  
Ja, ĵus knedis mi.

Hieraŭ  
mi serĉis vane  
la kajeron helbluan.  
Flustris vi, ridosane  
Mi? Propra mane?

Hundido  
venis donace.  
Estis ĝi tre ŝatata.  
Ve, forkuris ĝi pace,  
Ploris vi lace.



## Aŭtuna elegio

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Folioj  
lulantaj vente  
falas de sur branĉaro.  
Preĝas mi duonsente  
emoci-pente.

Kuŝejo  
kruda betona.  
Ŝanĝiĝas jarsezono.  
La influo persona.  
Ĝojo duona.

Migrado  
de birdoj suden.  
Klara aŭtuna bildo.  
Vibras sonoj aeren  
trans hemisferen!

Mirindaj  
bildoj de kampoj .  
Flavobrunaj pejzaĝoj  
sur la montopaŝtejoj  
kaj plataj valoj.

Dum nudas  
arboj , putranta  
estas foliaro.Nur  
Luno mutas brilanta  
vigle vaganta.



\*Sopir-al-sudo: ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj  
de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

## Magazeno

—laŭ ĉinesko Heyebei\*

Bela magazeno  
beno  
komerca.  
Per grandrabata vendo.  
Mendo  
apreca!

\*Heyebei (*Lotusfolia taso*): ĉina fiksfirma poemo el 6  
versoj de 6,2:3:7,2;3 silaboj, laŭ rimarangô aab,ccb

## Irma Gorte

## Permesi al si superfluaĵojn

*Feliĉo estas kiam vi komprenis, ke pano, kiun  
vi bakis, estas pli dolĉa ol ajna torteto el  
sukeraĵejo.*

*Orienta saĝeco*

Mi iris laŭ mallarĝaj stratetoj de

nekonata urbo kaj kun intereso fikse rigardis vitrinojn de ekzotikaj butikoj. Ĉi tie estis ĉio! Estis memoraĵoj, bildoj de lokaj pentristoj, ajnaj diversaj manĝaĵoj, ree memoraĵoj... Nu pri kio ĉi tie mi devas skribi artikolon? Mi ne sciis. Mi ofte vojaĝas ne nur pro ripozo sed ankoraŭ pro neordinaraj, nekredablaj historioj, pri kiuj mi volas rakonti al la legantoj.

Oho! Kio okazas? Jen estas mia ĉasaĵo. Mi ekvidis strangan bildon: simple ne kredebla amaso de virinoj. Ili amasiĝis apud enirejo de butiko kun pompa nomo, kiun mi tradukis en rusa lingvo kiel “Viroj al dolĉaĵo” aŭ “Dolĉaj viroj”.

Mi ekvolis rigardi, kion oni tie vendas? Aromo de spicoj kaj vanilo kiel delikata narkotiko volvekovris kaj allogis proksimiĝi. Mi decidis aliĝi al virina socio. Dum vico malrapide moviĝis rekten, mi rigardis elirantajn el butiko kun kontenta aspekto posedantinojn de helaj skatoloj, kaj en ĉiu vizaĝo sen escepto estis rideto! Mia scivolemo, kiel ĉe ceteraj virinoj parolantaj en diversaj lingvoj, pligrandiĝis post ĉiu minuto.

Finfine mi eniris en sekreta butiko: tiu vendejo estis... sukeraĵejo! Ĉie en vitrinoj estis ĵus bakitaj, belaj kaj, juĝante laux ĉio, dolĉaj viroj. Sed virinoj, virinoj! Jen kiel! Ili gustumas, diskutas, demandas ĝuante per proceso de kontemplado de manĝeblaj viroj kaj gusto de la viroj. Estas foiro de tortetoj!

Pensoj alternis kun rapideco de fulmo: bonega ideo... Kiel estus bone, se mi intervjuos mastron (aŭ mastrinon)! Kiu estas ĉi tie senco?

Posedanto de sukeraĵejo estis interesa, jam ne juna, tre hela kaj gaja viro, kiu kun granda plezuro rakontis al mi historion, kiun mi skribis por vi.

– Mi estas sukeraĵisto, mia nomo estas Pepe, kaj mi ŝatas mian laboron! Mian sukeraĵejon vizitis diversaj homoj: feliĉaj geamatoj, kvietaj maljunuloj, gajaj amikinoj, bruaj kompanioj kaj iufoje... Jen tiu “iufoje”

maltrankviligis min. Iufoje venis ĉarmaj junuloj, tre junaj, aŭ solidaj sinjorinoj. Jen venis tia sola virino, prenis iun torteton, eksidis ĉe tableto kaj, ne rimarkante guston, ne ĝuante, formanĝas la torteton sen plezuro kaj mallaŭte dankinte foriras...

Mi vidis tiun bildon preskaŭ en ĉiu tago. Mi vidis en vizaĝoj doloron, seniluziigon aŭ grandan malgajon. Mi malgajiĝis kun ili kaj tre volis helpi. Sed kiel? Kiel instrui al ili ĝui pro ĉiu minuto, pro ĉiu momento de vivo ne turnante atenton al malfeliĉo kaj perdo de iluzioj?

Kaj tiam al mi venis tia neatendita ideo: baki tiun iluzion ĉi tie kaj tuj. Mi decidis fari eksperimenton!

Nun en mia sukeraĵejo en vitrino vi povas vidi multon da tortetoj de vira sekso. Ĉiun torteton mi bakas kun amo kaj grandega plezuro. Mi tre volas donaci al aĉetantinoj feston de gusto kaj ĝuo. En ĉiu dolĉa peceto mi dividas mian sentadon de festo de vivo!

Rigardu, ĉarma junulino. Vi aliras al vitrino, kaj tie sur vendotablo estas grandega elekto de tortetoj! Kaj ĉiuj tortetoj estas viroj. Amataj viroj. Tiuj, kiuj ĝojigas kaj pro kiuj vi iufoje estis malgaja. Tiuj, kiuj donacas feliĉajn momentojn, sed poste seniluziigis vin aŭ ĉesis ami, pro kiuj vi ne dormas nokte aŭ ploras... Kaj jen ili estas ĉi tie, antaŭ vi. Ekrigardu, fiksrigardu, ĉu vi rekonas? Kiu el ili estas via? Ekrigardu, ĉu eble estas li? Gustumu, ne ĝenu vin!

Mi gustumis proponitan al mi torteton, kiu similas nian rusan torteton “Korbeto”.

– Li estas vera mastruma viro, – Pepe daŭrigis. – Forta, sableca torso-fundamento, de supre riĉa ĉapo de aera meringelo kaj interne estas plej interesa, fruktoj-beroj, marmelado aŭ ĵeleo – ĉefa sekreto de la torteto. Sed tuj vi ne povas ekscii sekreton de lia animo. Li konstruos al vi aerajn palacojn, kiuj similas la ŝaŭman ĉapon, promesos diversajn bonojn, sed vi, naiva, kredis!

